


Du provoj formi la plei grandan aidoso-banton de la mondo



## ENHAVO

Presindikoj kaj komenca saluto p. 2

### **FOKUSO: Ekstretoj de ĉielarka emancipiĝo**

Mortpunoj en Irano p. 3  
 Transseksino en la itala parlamento p. 4  
 Gegejoj kiel ekonomia pluso p. 7

### **AIDOSO: bantaj eventoj kaj scienca sukceso** p. 4

Monde plej granda aidoso-banto p. 5  
 Eltranĉi la viruson el la ĉelo p. 5

### **Temoj**

gratulon, religio, drogoj p. 10  
 burĝoni, amuzejoj, enketo p. 11

## L. S. G.

### Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj

interretejo: <http://lsg-esperanto.org>  
adreso: la sekretario (vidu sube)  
membriĝo: ĉe la sekretario  
kotizoj: 10 EUR por 1 jaro  
 25 EUR por 3 jaroj

### Estraro

prezidanto [arvimide (ĉe) earthlink.net]  
 Arnold VICTOR, Usono  
 Apartment 1, 160 West Eleventh Street  
 New York City, New York 10011, USA

sekretario [lasekretario (ĉe) gmx.net]  
kaj kasisto [lakasisto (ĉe) gmx.net]  
 Rolf, Germanio

varbado [fsoghomonian (ĉe) yahoo.fr]  
 Francis, Francio

estraranoj [kvakke (ĉe) hotmail.com]  
 Torstein, Norvegio

retejo [randy.dean (ĉe) pobox.com]  
 Randy, Usono

## FORUMO 137

### Membrogazeto de la LSG (3 / 2007)


adreso: lasekretario (vidu supre)  
redakcio: [laredaktanto (ĉe) gmx.net]  
 Bernvardo, Germanio

interreta versio: La gazeto aperas ankaŭ interrete kiel PDF-dosiero (vidu interretejo) Por via integro ĉiuj eventualaj familiaj nomoj kaj adresoj estas forigitaj en la interreta versio.

ekspedo la sekretario (vidu supre)  
*Nepre **ne** kontaktu la personon sur la ! etikedo de la koverto. La persono **ne** estas ligano. Ni nur pro la favoraj poŝtarifoj forsendas la gazeton el Ĉeĥio*

## Saluton al vi ĉiuj

En tiu somera eldono la fokuso prezentas tri tre diversajn ekzemplojn de la ĉielarka emancipiĝo, kies samtempeco min okulfrapis dum miaj informserĉoj. Kiom groteske malsame estas traktataj homoj kun transnormaj inklinoj en multaj landoj de la mondo! Kiuj el la plej multaj de ni povas eĉ nur vage imagi devi morti nur pro sia gejeco. Aliflanke homoj kiel Vladimir Luxuria donas vere necesajn signojn de espero, kiuj gajnis influriĉajn poziciojn kaj ankaŭ agadas internacie per tiuj rimedoj, kiujn donas la arto de la altekultura politiko, al kiu oni nur povas deziri sufiĉan efikecon kontraŭ tiaj ekscesoj de sovaĝa barbareco.



(Mi hodiaŭ lasis foti min por la pasporto, kaj la foton mi ne volas kaŝi antaŭ vi. Por ke almenaŭ iun imagon vi havu pri la rekaktoro)

elkore salutas

*Bernvardo*

**Kontribuoj por FORUMO kiel informoj, bildoj kaj artikoloj estas ĉiam bonvenaj**

*Vi bonvolu kompreni ...*

*... ke nur libere uzablaj kontribuoj povas esti akceptataj*

*... ke estas neniu garantio, ke alsenditaj kontribuoj estos publikigataj*

*... kaj ke materialo nur en esceptaj kazoj povas esti resendata al vi.*

*Ni konservas al ni la rajton redakcie ŝanĝi kontribuojn.*

*Nesignitaj artikoloj estas de la redakcio.*

## Mortpuno por gejoj en Irano

En la lasta semajno de julio 2007 la Irana respubliko pendigis ĝismorten 16 virojn, ties plejo pro sia samseksemo, kiel deklaris s-ro Hossein Alizadeh kaj s-ino Grace Poore de la International Gay and Lesbian Human Rights Commission (internacia komisiono por gejoj kaj lesbaj homrajtoj); kaj tio kun la aprobo de multaj Irananoj, ĉar en ties opinio same kiel en tiu de la tiea leĝaro, la islama Ŝaria, la samseksemo estas de sama figraveco kiel ekz. perfortigo, incesto kaj misuzo de infanoj, kaj tial estu punata per la mortopuno sub la titolo "perforta krimo". Laŭ indikoj de diversaj homrajtaj organizoj, en Irano ekde la jaro 1979, kiam la ajatolaoj transprenis la regipotencon, jam estis mortigitaj apud 4000 gejoj kaj lesboj pro sia samseksemo.

En Irano la punatoj estas alten tirataj per gruo kun ŝnuroj ĉirkaŭ siaj koloj je la loko de siaj misfaroj. Tiu metodo prezentas la krimulojn bone al la scivolemuloj, kaj la morto krome estas pli doloriga, ĉar ĝi pli longe daŭras.

Tiu mortpendigo estas tamen nur parto de pli granda ondo de mortpendigoj, kiu dum la nuna tempo superfluas Iranon. Komence de aŭgusto estis publike pendigataj du viroj akuzataj pro mortigo de la vica ĝenerala advokato de la ŝtato, kaj en la nord-oriento en la provinca ĉefurbo Maŝad oni ekzekutis sep homojn pro perfortigo, homrabo kaj raba atako, kiel eksplikis polica proklamisto. Kaj la menci



itaj ekzemploj ne estas la solaj kazoj, kiuj indikas la volon de la regantaj ajatolaoj disciplinigi la popolon al obo al tia versio de la islamo kian ili taksas la veran. Al tio apartenas ekzemple ankaŭ la kelkfoja mortigo de homoj, kiuj estas "malamikoj de dioj" aŭ kiuj ne havas loĝlokon aŭ kiuj estas malsanaj je drogdependeco.

Novan kvaliton atingas la situacio en Irano tamen, ke nun estas akuzataj je morto du kurdaj ĵurnalistoj, kies amnestio forte estas postulata internacie, dirante, ke la Irano, kiu estas unu el la plej malnovaj kulturnacioj de la mondo, ne paŝu suben al la nivelo de barbareco. La mesaĝo ŝajnas klara: "Kiu diras ion malagrablan, kiu metas kritikajn demandojn tiu estas minacata per la morto".

# Transseksino en la itala parlamento

karakterizo de Anna Reiman, Romo

Ŝi estas la unua transseksino en Eŭropa parlamento. Unu jaron post sia elekto en la italan delegitaran ĉambron la komunistino Vladimir Luxuria [vladimir luksuria] estas respektata ankaŭ de siaj kontraŭuloj – kaj malkovras kelkajn similojn kun Silvio Berlusconi [berlusconi].



**Luxuria en la itala parlamento**

Por Vladimir Luxuria la vivo en la politiko komenciĝis kun fenkolo fluganta: Fenkolo en la itala signifas "finocchio" [finokjo] kaj krome estas fivorto por gejoj. Elektobatalaj helpantoj de la dekstra partio Alleanza Nazionale [aleanca nazionale] superĵetis Luxuria'n per la kruda legomo. Kelkajn semajnojn poste la nepino de la "duce" [duĉe], Alessandra Mussolini, en puplika babilrondo kriaĉumis: "Pli bone faŝisto ol gejaĉo." Fine okazis la afero de la necesejo. Elisabetta Gardini, proklamistino de la Berlusconi'a partio Forza Italia [Forca Italia], incitiĝis, ĉar Luxuria uzis la porvirinan necesejon de la delegitara domo.

Ke Vladimir Luxuria, en 1965 en la suditala Foggia [Foĉa] nasikita en vira

korpo kiel Wladimiro Guadagno [Guadano], enpaŝis la delegitaran ĉambron por la neo-komunistoj, tio elvokis en Italio vehementajn konfuzojn. La dekstrularo koncentris siajn agojn por surscenigi kvazaŭ skandalon la kandidatecon de la eksa pomporeĝino.


Unu jaron poste nun oni devas mendi pli grandajn ĉambrojn por oficialaj sinprezentoj de Luxuria. Intertempe ankaŭ la dekstraj politikistoj ne plu protestegas, kiam la parlamenta prezidanto vokas ŝin je "Sinjorino delegito" anstataŭ je "Sinjoro". "Tiu mem nun alparolas min tiel", diras Luxuria, "intertempe mi ricevas multan respekton ankaŭ de miaj politikaj kontraŭuloj".

En Italio, kie la hartransplantoj kaj la elektra kororitmigilo de Berlusconi kaj la korpoj de ĉiuj aliaj potenculoj estas, male al politikaj enhavoj, pasie pridisputataj, la geja ikono Vladimir Luxuria montris rapidegan suprenkuron al politika steleco . . .

Estas malfrua vespero en la Roma alternativa kvartalo Pigneto [Pinjeto]; Luxuria, alias Guadagno – kiel legeblas sube sur la domsonorila ŝildo – malfermas la pordon de sia malnovdoma loĝejo; longa, malhelgriza, trikita mantelo, bukraj nigraj haroj, distretitaj sportŝuoj, balancanta iro, senŝminka la vizaĝo, la manoj eksternormale mallarĝaj. Sur la sofo dormas longhara kato. Ĉe longa ligna tablo sidas la fratino de Luxuria kaj trinkas bieron.

Luxuria – tiu artista nomo signifas abundo aŭ volupto – flagigas sin mem kiel transseksino, kiel superseksa, volas esti alparolata kiel virino, kaj ne lasis fari iun seksoŝanĝan operacion. Konfuzo restas: en la hejmpaĝo de la

itala delegitara ĉambro Luxuria estas indikata kiel aktoro.



Luxuria kiel artistino

### "Timo pri sinprezentoj kun ĉiuj tiuj formalecaj homoj"

Estis Fausto Bertinotti, neo-komunisto kaj prezidanto de la delegitara ĉambro, kiu malfermis al tiu konata artistino, aktorino kaj geaktivino la vojon en la grandan politikon: Kiam Bertinotti ŝin demandis, ĉu ŝi volas kandidatiĝi por la pinta loko de la "Rifondazione Comunista" [rifondacione komunista], ŝi laŭ sia diro nepovis dormi plurnokte.

"Mi havis teruran timon pri la televidaj sinprezentoj, pri devi paroli pri ekonomiaj demandoj, pri paroloj kun ĉiuj tiuj formalecaj homoj." Luxuria ridas ombran ridon. "Aldoniĝas: Mi ne havas politikan biografion, tial mi devis labori tre pene", ŝi diras, ekstaras, vagas tra la loĝejo, kaj ekardigas cigaredon. "Mi provas fari tion tre serioze, mi estas fidinda homo". Kiam ŝi poste estis elektita en la parlamenton, ŝi sentis sin kvazaŭ la unua virino, kiu iam ajn estiĝis prezidanto aŭ kvazaŭ la unua islamano en la usona senato. "Estas giganta respondeco", diras Luxuria.

Konfesantan transseksinon en la parlamento ĝis nun nur havas Novzelando: la bondezira telegramo de tiu, Georgina Beyer [ĝorĝina bajr], alvenis la tagon post la elekto en Italio.

Luxuria sin retroapogas en la mintolora tola sofo en sia loĝoĉambro, la mobiltelefono sonoras, amiko konektiĝas. Kromece la 41-jaraĝa fosas en papera ujo por dokumentoj. La sekvan tagon okazu en la delegitara ĉambro la debato pri la liberigo de itala ĵurnalistino Daniele Mastrogiacomo [daniele mastroĝakomo], kiu estas interŝanĝota kontraŭ kvin talibanaj enprisonuloj. Ŝi opinias, diras ŝi ĉagrene, ke la itala helporganizo "Emergency" [emerĝensi] nun fariĝis celo de akuzparoloj, ĉar ĝi laŭfame kunlaboris kun la talibanoj. "Tion faras nu ĝuste tiuj, kiuj enplektiĝis en la malpura flanko de la milito. En tio, kion usona prezidanto Bush tiom elokvente nomas "kolateralajn damaĝojn".

### "Ni ambaŭ portas altajn ŝuojn kaj nin ŝminkas"

Kritiko la militon, paroloj en la kultura komisiono pri korupcio en la piedpilka sporto – sed antaŭ ĉio Luxuria sin komprenas kiel reprezentanton de gesamseksemuloj, getransseksuloj kaj ties parencoj en la politiko. En lando, en kiu nu estas "por ĉiuj krom por malgejaj viroj pli malfacile ol en aliaj Eŭropaj landoj esti akceptataj en la politiko", ŝi diras. Ŝi mem, diras ŝi, estas pro sia populareco en Italio "en nekredeble privilegia situacio, mi havas multe pli facilan vivon ol la plej multaj transseksaj".

Hodiaŭ ŝajnas, kvazaŭ la atakoj pro ŝiaj seksa identeco kaj pasinteco pli utilis al ŝi ol male. Kiel parolistino ŝi nanigas multajn, oni interflustras en la

ekspertularo pri la itala politiko. La itaj virinoj devas esti dankaj al ŝi pro ŝiaj emancipigaj iniciatoj, la neo-komunistoj havas idolon korpe de Luxuria. En la parlamento ŝi prezentas sin tre seriozeca. Dum aliaj provas prui Luxuria'n kiel bombastaĉan transvestitinton, ŝi povas dismontri sian studandan diplomon pri literatura scienco.

Reataki per la samaj armiloj kiel siaj kontraŭuloj, tion tamen evitis Luxuria. "Mi ne inklinas al suĉi politikan kapitalon el la pravivo kaj punprocezoj de miaj kolegoj." Eĉ se kelkfoje tiklas la impulso malkaŝi tiujn, kiuj pleje blasfemas kontraŭ gejoj, kiel konstantajn gastojn en la konataj samseksemaj diskotekoj. "Mi fakte ja preferas sinmalkaŝadon ol malkaŝadon per aliaj", diras Luxuria. Tamen por sinmalkaŝado antaŭe devas fariĝi la socio pli libera. "Ankaŭ por tio mi volas labori".

Nur unu fojon ŝi ne povis rezisti. Kiam Silvio Berlusconi ŝin bonvenigis en la politiko per tiuj vortoj: "Almenaŭ ne viro kaj tial ne konkurenco por mi", ŝi mesaĝis en la direkto de la ministrara prezidanto tiama: "Nu, ni ambaŭ portas altajn ŝuojn kaj ŝminkas nin, antaŭ ol ni iras amuziĝi".

### **Ambasadorino por gejoj en islamaj landoj**

Eksa pomporeĝino kiel seriozeca politikistino en la parlamento: revolucio eble, por la maĉo-afina Italio – por Luxuria mem la plej grava estis tiu persona momento en la ferioj kun siaj gepatroj en Suditalio rekte post la elektado. Homoj sur la stratoj kuris al ŝi, skuis ŝian manon, vokis al ŝiaj gepatroj: "Vi povas fieri pri via filino." – Kaj tiam", diras Luxuria, "mi vidis, ke mia patro, kiu ĝenerale ĉiam hontas pro mi kaj timas, kion povus diri la homoj pri ni, havis larmojn de ĝojo en

siaj okuloj." Estis la momento, diras ŝi, ekde kiam ŝia patro komencis povi ami ŝin pro tio, kio ŝi estas: la politika sukceso kiel naskohelpanto de la familia paco . . .

Ankoraŭ unu semajnon, kaj la komunistino proklamos sian unuan leĝopropozicion en la delegitara ĉambro. Temas pri la leĝa agnosko de getransseksuloj – pri tio, ke ankaŭ homoj, kiuj ne metis sin sub sekstransigaj operacioj, estu registrataj ĉe la italaj administracioj kiel de tiu sekso, de kiu ili sin sentas. Ankaŭ kun la registaroj de moderataj islamaj landoj Luxuria volas komenci dialogojn kaj engaĝiĝi por la samrajtigo de la gesamseksemuloj. "Tio estas aspekto de la homaj rajtoj, kiu nur tre malofte estas vorte esprimata", diras ŝi.

Post unu jaro en la politiko Luxuria ankoraŭ vagas inter la mondoj. Morgaŭ ŝi faros en Verona politikan parolon, tagon poste ŝi aktoros en Mantua en teatro. "Sed la gapo inter arto kaj politiko ne vere estas tre granda", diras ŝi.

*(el la germana Spiegel-online)*

---

### Redakciaj Notoj:

- En Forumo 136 la artikolo: "La tragika rakonto pri la Hinda princo" pro neatento glitis sub la rubrikon "Beletra Niĉo" Tamen la artikolo ne estas fikcio, sed baziĝas sur faktoj.
- La fokuso de la venonta Forumo estos la CSD trans la pasinta jaro. Vi estas kore invitataj sendi raportojn pri tiaj eventoj, kiel jam troviĝas kelkaj en la yahoo-listo lsg-ano.

## Gegejoj kiel ekonomia pluso

Alta kvoto de gesamseksemuloj en la urboj ne nur estas signo por malferme-eco. La tiel nomata "gay index" (geja indikilo) laŭ la opinio de ekspertuloj pli kaj pli fariĝas grava faktoro por la ekonomio.

La usona sciencisto Richard Florida [riĉard florida] difinas altan kvoton de gegejoj kiel kvalita karaktero de urboj. Suvereneco en la rilato al la alieco je la fino de ĉiuj kalkuloj efikas plusige.



Laŭ la takso de la sciencisto la menciita geja indikilo fariĝos eminenta ekonomia faktoro en la estonteco. Li eltrovis, ke en sidejoj de alta teknologio kaj en bonfartantaj urboj de Usono kiel ekz. San Francisco [Francisko] aŭ Seattle [sietl] loĝas multaj gegejoj, sed ankaŭ multaj anoj de aliaj minoritatoj. Tio, laŭ li, estas la recepto de sukceso por tiuj metropoloj.

Kie ŝatas vivi gegejoj, tie devas regi iu klimato de malferme-eco, kaj tiu allogas ĝenerale homojn kiel mallaŭajn pensantojn, kreivantojn, komputil-frenezulojn ktp. Ĝuste tiajn homojn bezonas urbo en la postindustria erao, por esti inter la unuaj rangoj multrilate.

La teorio de la sciencisto do ne temas pri pozitiva diskriminacio aŭ pri la kliŝo de la trendgvidula funkcio kaj de la pli alta aĉetopotencialo de la gegejoj plej ofte seninfanaj. Ne estas vidataj kiel puŝanta forto la gegejoj mem, sed ili estas la indikilo pri kie la sociokultura plureco estas sekvata de ekonomia sukceso.

En Germanio oni povas tiun argumentadon eble konfirmi ekzemple por la urbo Kolonjo, eĉ se oni povus diskuti, kio estas la kaŭzo kaj kio la konsekvenco. Ĉiukaze la urbo estas hodiaŭ magneto por kreativaj homoj, artistoj, porkomunikilistoj aŭ programistoj. La plej granda softvara entreprenado de la mondo ekzemple planas sian filion en Nordrhein-Westfalen (unu el la 16 landoj de Germanio) translokigi de Neuss [nojs] al Kolonjo, tiel provizante la urbon per cent laborlokoj novaj.

La teorio de la sciencisto tamen estas nepravigebla en la ĉefurbo de la ŝtato, nome en Berlino. Tie regas malkaŝe geja urbestro, la scenumo geja-lesba estas grandega kaj tre plureca, kaj la urbo entute unu el la plej tolereca en la mondo, tamen Berlino rilate al la ekonomia situacio estas preskaŭ katastrofo, en kiu kvarono de la enloĝantoj devas vivi en iu formo de publika subteno.

# A i d o s o :   b a n t a j   e v e n t o j   k a j   s c i e n c a   s u k c e s o

## Monde plej granda aidoso-banto



Mi aŭdis pri tiu provo, starigi rekordon, de amiko de mi post mia labortago kaj tuj decidis partopreni en tia evento, kian mi certe ne tre ofte en mia vivo renkontos. Okaze de la ĉi jara Germana-Aŭstria Aidoso-Kongreso oni planis formi la plej grandan aidoso-banton de la mondo. Oni elektis kelkajn stratojn en la urba centro de Frankfurt apud Main en Germanio (vidu skizon sur la titola paĝo), kiu en sia tuto pli malpli formis la konatan banton, kaj invitis homojn veni kaj je difina tempopunkto je la manoj sin teni. Ekde du horojn antaŭe oni povis



Hauptwache

registriĝi je budoj de la organizantoj kaj preni senkoste ruĝan T-ĉemizon,

ombreleton aŭ kartonkvadraton, kaj poste gvidantoj distribuis samdense la ularon laŭ la planita linio.

Nu, mi post la registriĝo iomete vagis sub la sufiĉe bela vetero, tamen ne vere somera, ĝoje salutis konatojn, ne salutis malkonatojn, fine renkontis iun amikon, kiun mi dum longa tempo ne estis vidinta, kaj ni klaĉis pri la amasoj de lernantoj, kiuj troviĝis inter la partoprenantaro.

Ne sen bona senco oni ja estis propagandinta pri la iniciato en la lernejoj, por informi la gejunulojn pri la aidoso-banto kiel simbolo de solidareco por la aidoso-malsanuloj, kaj pri la fakto, ke ĝis hodiaŭ aidoso estas vere mortiga malsano, kaj ne io kiel gripo, kontraŭ kiu oni glutas kelkajn pilolojn kaj bone; tiaj famoj oni nun ofte aŭdas inter la pli junaj homoj.

Poste la partnero de mia amiko ankaŭ alvenis kun sia hundo, kiu pro sia ruĝa kolbanto de solidareco estis ofte fotata, kaj ni havis beletan horon de klaĉo kaj ŝercis kun la aliaj homoj ĉirkaŭe. Tiom inspire ni kune umis, ke tagojn poste ni renkontiĝis denove sub tute aliaj cirkonstancoj, sed tio estas alia afero.

Fine laŭtparoliloj proklamis, ke nun ni paŝu en la mezon de la strato kaj tenu nin je la manoj, kaj la polico baris la stratojn por la trafiko. Alte en la ĉielo ni nun povis observi helikopteron, kiu flugis iun nekompreneblajn manovrojn, sed ni sciis, ke ĝi ĉion filmis el la ĉielo por dokumenti la aferon. Kompreneble ni svingis la manojn por saluti ĝin.



Nun la afero rapide finiĝis, aŭtomobiloj denove komenciĝis veturi, kaj ni nin adiaŭis bonkore, por post tia interesa tagmeza paŭzo reiri al la laboro.

Kompreneble mi nun atendis novaĵojn pri la registriĝo de tiu provo de la 29a de junio 2007 kiel rekordo en la libro Guinness, ĉar la postulitan nombron de 3000 personoj ni ja estis superintaj je plusa milo. Sed vane.

La solvo de la enigmo aperis al mi iom poste, dum mi informserĉis por tiu ĉi artikolo. Nome jam kelkajn tagojn antaŭe, la 17an de junio 2007 jam, en la nordo de Germanio, en la urbo Kiel, oni estis entreprenita similan provon formi la plej grandan aidoso-banton de la mondo, kaj vere, ili kolektis 10.000 homojn tiucele kaj kompreneble gajnis. Okaze de la Kiel'a Semajno, kiu estas mondfama konkurso de velŝipoj kaj -boatoj, la Nordelba eklezio (Elbe estas rivero fluanta ekz. tra Hamburgo) per sia "solidareco-kampanjo AIDS" tie organizis la iniciaton, helpata de multaj organizoj kiel ekleziaj paroĥoj, sindikatoj, la Kiel'a asocio de medicinistoj, pluraj lernejoj, kaj la ministrejo por socialoj.

Dum 150 junuloj de la fajrobrigado kun siaj helpveturiloj formis la finojn de la

banto, markis 100 ruĝaj aerbalonegoj la tutan linion de la banto, laŭ kiu pli ol



gejunula fajrobrigado

10.000 homoj estis ordigitaj per ĉ. 300 skoltoj el la nordelbaj paroĥoj. Ĉiuj partoprenantoj estis vestitaj per ruĝaj jakoj, puloveroj, ĉemizoj aŭ portis iujn ruĝajn akcesoraĵojn kiel ombrelojn aŭ grandajn tukojn. El la maro salutegis 2 grandaj tradiciaj velŝipoj la homojn kaj muzike akompanis ilin la Kiel'a ĥoro trombona. 100 nove konfirmaciitaj junuloj kolektis monon por projekto, kiu disponigas la necesajn medikamentojn kontraŭ aidoso por infanoj en la Afrika regiono apud la Kilimanĝaro.

Ne mirigas, ke tiu klare pli ampleksa kaj granda evento fine ricevis la noton en la Guinness-libro de la rekordoj. Kaj por diri la veron, mi kredas, ke ili vere meritis tion.

## **Eltranĉi la viruson el la ĉelo**

Esploristoj en Germanio la unuan fojon sukcesis tranĉi HIV-viruson el infektita ĉelo. Pro tio ŝajnas ne plu malebla, ke oni povos resanigi aidoso-malsanulojn iam. Hodiaŭ oni nur povas limigi la multiplikiĝon de la virusoj certgrade,


sed ne detrui ilin, post kiam ili estis sin plektintaj en la ĉelan kernon. Kunlaboris por tiu medicina farego la Hamburga instituto Heinrich-Pette por eksperimenta virusologio kaj la Dresena instituto por molekulara ĉelobiologio kaj genetiko. Ili bredis dum pli ol 120 evoluaj generacioj el enzimo, kiu reagis kun molekulo-

lo nur iomete similan al HIV-DNA, novan enzimon, nomatan rekombinazon TRE (rekombinazoj tranĉas kaj alie kungluas pecojn el DNA), kiu emas ekzakte agi je la finoj de la HIV-DNA, kaj la ĉelo digestas poste la eltranĉitan pecaron. Nun la ĉelo estas sana ree.

Prof. Joachim Hauber de la Hamburga instituto deklaras, ke laŭ kuraĝaj prognosoj oni povas esperi eble post dek jaroj taŭgan metodon por plisaniĝi infektitojn surbaze de tiu procezo. Oni devus rikolti praĉelojn el la korpo de la malsanulo, forigi la HIV-DNA el la ili, kaj retransigi ilin en la pacienton, kies imuna sistemo per tio estas subtenata. Tiu metodo de alta tekniko tamen verŝajne ne sukcesos forigi ĉiujn ĉelojn infektitajn, sed povos tamen teni sub kontrolo la malsanon.

La originalan artikolon vi povas legi en la angla gazeto "Science" de la 29a de junio 2007, sub la aŭtoraj nomoj Sarkar, Hauber, Hauber kaj Buchholz.

### Aldonigo: Proceso de la infektiĝo



Por pli bone kompreni, kion esploris ili, oni devas iometon scii pri la funkcio de la HIV- infektiĝo. Pro tio kelkajn eksplikajn vortojn subtenatajn per la skizo supre:

La skizo montras, kiel funkcias la HIV-infektiĝo de ĉelo CD4 (A). Tiaj ĉeloj laboras kiel organizantoj de la defendo kontraŭ infekcioj, kaj pro tio estas vera ruzaĵo de la HI-viruso (V), ĝuste ataki tiajn. La viruso disponas por sin glui al la ĉelo pri ankro nomata gp120, kiu konformas al difina receptoro (C) de la ĉelo. Por fakte penetri tra la vando (1) ĝi krome bezonas koreceptoron (D), kaj sole la RNA, fadena molekulo, kiu portas la heredadajn informojn de la viruso, nun naĝas en la ĉelon kaj malkomprimiĝas sin. Nun produktas (2) enzimo el substancoj de la ĉelo negativan kopion de la virusa RNA, nomata DNA (G), tian, kia konformas al la DNA (B) de la ĉelo. Ĝi nun estas preta penetri (3) en la kernon de la ĉelo, kie estas konservata la ĉela DNA, tranĉas tiun je certa loko kaj enveldas sin (4) en la gapon. La kerno nun ne nur generas plankopiojn de utilaj substancoj sed ankaŭ de virusaj partoj kaj sendas tiujn planojn al la uzinoj de la ĉelo (E), kiuj produktas longegan fadenon de virusa RNA. Tion devas distranĉi enzimo al taŭgaj eroj, kiuj kolektiĝas (5) je la vando de la ĉelo. Tie formiĝas niĉo, kiu sin volbas eksteren, fermas sin kiel malgranda globo ĉirkaŭ la RNA, kaj dispartiĝas (6) de la ĉelo kiel nova viruso.

Tiujn procezojn oni devas koni por vere kompreni, kion la du sciencistoj fakte evoluigis. Ĉiuj medikamentoj ĝisnunaj atakas la reproduktigan proceson de la viruso aŭ ĉe la reskribado al DNA-kopio (2) aŭ ĉe la distranĉo de la longa RNA-fadeno en partoj (5). Plej lastaj evoluigoj celis bari la enpenetron (1).

Hauber kaj la aliaj sukcesis nun renversigi la enplektiĝon (4).

## T E M O J      ○ ○ ○ ○ ○

### **RELIGIO: Germana HUK fariĝis 30**

Tiu organizio "Homosexualität und Kirche" [samseksemo kaj eklezio] fondiĝis okaze de la Berlin'a eklezia tago en 1979 kaj nun dum 30 jaroj provas EN la tradiciaj kristanaj eklezioj (kontraŭe ekz. al MCC-eklezio fondita EKSTER la kutima eklezia aro) plibonigi la pozicion de la gegejaj homoj. Kun tiom sukceso, ke en urboj grandaj nun la membraro malkreskas pro sufiĉa akcepto de tiaj homoj en ekleziaj rondoj, ekz. la Frankfurta CSD ofertas 8 (!) diservojn de diversaj organizoj aŭ komunumoj, tamen ne katolikajn.

### **DROGOJ: Rango de danĝereco**

Skemon por taksu la danĝerecon de oftaj drogoj evoluis grupo ĉirkaŭ la brita esploristo David Nutt ĉe la universitato Bristol post konsultoj kun pli ol 40 diverskampaj fakuloj. Tri faktorojn uzas la skemo por juĝi la drogan malutilon: La sekvojn por la sano de la konsuminto (ekz. venenigo aŭ infektoj) la danĝeron de dependigo (korpa aŭ psika), kaj la efikon de la konsumo al la kunhomoj (ekz. agresoj, krimoj, sanigaj kostoj). La rezultoj klare montras, ke la juraj klasigoj subtaksas forte la danĝerecon de alkoholo kaj de tabako. Tiel la 10 plej danĝeraj drogoj rangas: heroino, kokaino (inkl. "crack"), barbituratoj, strate vendita metadono, alkoholo, ketamino, bencodiacepino (maldolorigilo), amfetamino, nikotino, buprenorfino. Multajn certe mirigos, ke kanabo, lsd kaj "ecstasy" nur havas la rangojn 11, 14, kaj 18 laŭ tiu skemo.

### **RELIGIO: Afrika US-anti-eklezio**

La anglikana eklezio de Nigerio fondis anti-eklezion en Usono, ĉar laŭ ĝia juĝo la Usonaj anglikanoj, kies eklezio estas la episkopala, estas tro akceptema rilate al samseksamaj homoj. Pro tio la Nigeria ĉefepiskopo Peter Akinola en aprilo vojaĝis al la ŝtato Virĝinja en Usono kaj ordinis Martyn Minns, konservativan teologon, al nova episkopo. La prezidanto de la Usono Konferenco de Episkopoj, episkopino Katherine Jefferts Schori [kserin ĝeferts skori] antaŭe estis sensukcese petinta la Nigerian episkopon rezigni pri tiu ideo kaj respekti la tradicion de la anglikana eklezio, kiu ampleksas je 11 milionoj de kredantoj, ne varbi membrojn en fremdaj landoj. La Anglikanoj estas dividitaj en du anaroj, kies liberalaj partoj troviĝas en Norda Ameriko, Eŭropo kaj Aŭstralio, la konservativa alo rezidas en Afriko.

### **DROGOJ: Morto de GAYDAR'estro**

En februaro mortis la 38jara Gary Frisch [geri friŝ], kiu fondis 1999 en Britio kun amiko la faman interretan gejan portalon GAYDAR'on, plej grandan en la mondo, kun ĉirkaŭ 3,5 milionoj uzantoj. En aprilo nun proklamis London'a esplora juĝejo, ke la Frischa korpo enhavis, krom alkoholon, grandan kvanton de ketamino "special K", kiu estas ŝatata substanco por senkonsciigi grandajn bestojn, sed uzata inter amorantoj pro siaj – en dozo taŭge adaptita - konscion ŝanĝanta kaj muskolojn malstreĉanta efikoj. Verŝajne, diras la proklamo, Frisch ne plu sciis, kion li faris, kaj saltis trance de sia balkono suben en la morton. Li jam estis en psikologia varto kaj eble ankaŭ prenis sendepirimigajn medikamentojn.

## Korajn Gratulojn

La redakcio gratulas al **La Eta Princo** okaze de la publikigo de unua libro de liaj poemoj. Li prezentis al ni, aparte en la Yahoo-retolisto "LSG-ano", jam multajn belajn poemojn profunde emociajn, kial ni volas danki lin elkore.

### **Burĝoni: Ĉinio iom pli permesema**

Observeblas, ke en Ĉinio la aero por gejoj kaj lesboj fariĝas iomete pli libera. Ekde aprilo, por ekzemplo videblis serio de dek du elsendaĵoj por samseksemaj ĉinoj, fare de la televidejo Phoenix [feniks] el Hongkongo (tamen nur per la interreto). En Pekino kaj Ŝanhajo ekzistas rilataj dancejoj, la universitato Fudan en Ŝanhajo ofertas seminarion pri la kulturo geja, kiu estas multe vizitata. Verŝajne la plej utila organizo tamen estas helpa telefono en Ŝanhajo financata per la fonduso Ĉi-Heng. Ĉirkaŭ cent helpantoj konsilas senkoste pri temoj psikologiaj, juraj, kaj pri aidoso. La postulado pri tiaj servoj estas tiom granda, ke la organizo devis limigi la daŭron de la paroladoj je po 20 minutoj. La plej granda bezono estas tiu je emocia dialogo, ĉar la ĉinoj pro la familia kaj socia premo preferas edziĝi ol malkaŝi sin samseksema.

### **Amuzejo: geja biotopo en Aŭstralio**

Unuafoje en Aŭstralio geja drinkejo en Melburno gajnis la rajton ekskludi heteroseksulojn. Tribunalo en ŝtato Viktorio verdiktis, ke Hotelo Peel [pil] rajtas ekskludi klientojn surbaze de ilia seksa orientiĝo. Hoteladministrantoj diris, ke tio ĉesigos mistraktadon

de gejoj far de grupoj de heteroseksaj viroj kaj virinoj. La decidon subtenis asocioj pri civilaj liberecoj. Tribunala prezidanto deklaris, ke grupoj de heteroseksaj virinoj trovas samseksajn virojn amuzaj, sed ke tia atento senhomenecigas ilin. Administrantoj plendis, ke malordaj kaj raŭkaj jupo- kaj fraulokunvenoj kreas venenan etoson por sia geja klientaro. Povi limigi la nombron de vizitantaj heteroseksuloj kondukus al pli sekura ekvilibro. En Melburno pli ol 2000 ejoj estas por heteroseksuloj, dum la drinkejo Peel estas la unusola ekskluzive por samseksemaj viroj. Asocioj por civilaj liberecoj diris, ke samseksemuloj rajtas povi malstreĉi sin sen timi provokojn de tiranetoj aŭ minacajn timigojn. Aŭstraliaj leĝoj pri egalaj ŝancoj malpermesas diskriminacion surbaze de raso, religio aŭ seksa orientiĝo. (*rap. Brian K.*)

### **Enketo favora klimato en Usono**

La akceptado de samseksema vivstilo atingis denove zeniton en Usono, tion montris enketo de la instituto Gallup, kiun tiu jam dum 30 jaroj regule okazigas. El la demanditoj diris 59 procentoj, ke samseksamo estu legala (1977: 43 procentoj). Konsento por geja edziĝo signalis 46 procentoj, kio signifas preskaŭ duobligon dum la lastaj dek jaroj. Male la Eŭropa enketo Eurobarometer montris, ke tie nur 44 procentoj estas por la instalo de la samseksa edziĝo, do pli malmultaj ol en Usono. "Samseksamo estas akceptebla alternativa vivstilo", tion prijesas 57 procentoj (1982: 34 procentoj). Pli detale respondis jese: virinoj 61 %; viroj 53 %; homoj pli ol 55jaraj 45 %; kaj tri kvarono de homoj de 18 ĝis 34 jaroj.